

Velado al Itala Kongreso 2017

Atingu la Italan Kongreson 2017 per velboato!
Sep taga ŝipvojaĝo por esperantistoj sur la Ionia Maro.
Semajno 19-26 Aŭgusto 2017 (antaŭ kongreso).



La "FEI", Itala Esperantista Federacio, organizas **veladon por esperantistoj** en la pitoreska Golfo de Taranto (sudorienta Italio). Ni velados admirante de la maro la plej tipajn vilaĝetojn de la regiono kaj ĝiajn mirindajn naturvidindaĵojn.

Velumi estas oportune por viziti interesajn lokojn en formo de respondeca turismo, krom la ebleco interrilatiĝi kun samideanoj kaj ferii kune en nekutima etoso. La velumantoj, ensorbite de la naturaj elementoj, estas en strikta kontakto kun la maro, la vento kaj la simpleco; sen bruo, sen malŝparo, sen urĝo. Estos ŝanco por renkonti novajn geamikojn esperantistajn ene de la emociiga nekutima kadro de la velkrozado.



La partopreno estas **malfermita al ĉiuj**, kaj velistoj kaj **novicoj**.

Ne estas bezonata antaŭa sperto pri velŝipado, tamen ĉiu partoprenanto havos la eblecon stiri la jahton kaj praktiki la velŝipajn manovrojn.

La velkrozado estos didaktika travivaĵo, tamen ne estos kurso de faka Esperanto pri velado, sed **kurso de vel-praktikado en Esperanto**. La jahtestro donos al ĉiu partoprenanto ilustritan kajeron pri velŝipaj manovroj en Esperanto. La jahtestro estas sperta itala velisto kaj velo-instruisto, volontulo, membro de Grupo Esperanto Tigullio, kiu parolas Esperanton (vidu noton 1 sube).



La programo:

- Enŝipiĝo sabate 19-08-2017 en Haveno de Policoro je la 18:00 horo.
- Enloĝiga aranĝo en jaĥto (vidu bildojn sube).
- Rapida aĉetado ĉe superbazaro por proviantaĵoj.
- Mallonga leciono por ekkoni la jaĥtan rigilaron.
- Tranoktado sur la jaĥto en du-kuŝlokaj kajutoj (ĉiunokte).
- Dimanĉmatene: malankriĝo kaj velado en la Golfo de Taranto.
- Dum la semajno ni velados vizitante Gallipoli, Porto Selvaggio (Sovaĝan Havenon) kaj eble Leuca.
- Ni navigos proksimume 4-6 horojn po tago kaj la totala itinero estos ĉirkaŭ 170 marmejloj.
- Ĉiun tagon: boardoj, alventaj ĝiradoj, subventaj ĝiradoj, bulenoj kaj aliaj emociaj velaj manovroj.
- Tagmanĝoj en la jaĥto dum la navigacio aŭ ankrite (ĉiuj tagoj).
- Vespermanĝoj en la jaĥto (kuirita de ni mem) aŭ en restoracio (kelkfoje).
- Vendrede: traŭro de la Ionia Maro por veladi al Policoro, kun ebleco navigi nokte aŭ sunleviĝe (se la vetero tion ebligas).
- Sabate: albordiĝo al Haveno de Policoro;
- Elŝipiĝo sabate 26-08-2017 je la 9:00 horo, nur kvin minutojn distanco for de la Kongresejo;
- Partopreno al la 84-a Itala Kongreso de Esperanto 2017.

Prezo po persono: € 590.

Speciala rabato: € 530 antaŭ 28-2-2017 (antaŭpago 25%, t.e. € 133 antaŭ 28-2-2017).

La prezo **inkludas**: luadon de la jaĥto, jaĥtestron kaj kajeron pri velŝipaj manovroj en Esperanto.

La prezo **ekskludas**: vojaĝelspezojn por atingi la jaĥton, komunan kason, kaŭcion, asekuron (noto 5), littukojn (noto 6).

Komuna Kaso: dependas de la konsumado, ĉirkaŭ 200 € po persono (vidu noton 2 sube).

Kaŭcio: 150 € po persono, tute redonebla (vidu noton 3 sube).

Nombro minimuma de partoprenantoj: 6 (vidu noton 4 sube).

Jen la lokoj kie ni navigos...



... kaj jen la jaĥto:

ĝi estos luata kaj estos modelo "Bavaria 44", 14 metrajn longa, kun 4 kajutoj, 10 kuŝlokoj, 2 necesejoj, kuirejo kaj saloneto.



Velado estas sporto, kiu postulas reciprokan respekton, kunlaboron en deĵorteamo kaj justan kundividon de la rimedoj (akvo, nutraĵoj, energifontoj). Estos plezuriga kunlaboro de ĉiuj por la navigado, la albordiĝo, la ankrado kaj la kuirado.



Vidu la [FOTOJN](#) de la pasinta jaro.

Ekkontaktu la jaĥtestron por informiĝi pri la disponeblo, skribu al alex@nodobandiera.it

Klaku ĉi tie por la [ALIGILO](#).

La Admiralo diras:

"La programo estas orientiga kaj estas submetita al modifoj surbaze de la vetera/mara kondiĉo krom de la boataj amasiĝo en la havenoj, je la nekontestebla juĝo de la jaĥtestro. Bonan venton al ĉiuj!"



Notu bone:

1. La **jaĥtestro** ne estas profesiulo, sed estas volontulo kun granda sperto de velveturado, de mara-arto kaj de boatoj. Li posedas la kvalifikaĵojn por konduki luadajn jaĥtojn. Li ĉiam zorgas sekurecon, altetaksas la veterprognozon, kapablas mastrumi la grupan evoluon. La manĝaj elspezoj por la jaĥtestro estas je kosto de la partoprenantoj kaj estas kovritaj per la Komuna Kaso.
2. Oni establos **Komunan Kason**, administritan de volontulo (ne la jaĥtestro). Per ĉi tiu kaso estas pagitaj ĉiuj komunaj elspezoj por: proviantoj, fueloj, alfiksiĝoj, fina purigado, lokaj taksoj, diversajoj. Ĉiu partoprenanto, escepte de la jaĥtestro, kontribuas al la komuna kaso. La suma kosto estos proksimume 30 € por tago po persono. La kaŭcio ne apartenas al la komuna kaso, sed estas aparte mastrumata.
3. La lukontrakto de la jaĥto inkluzivas la asekuron kontraŭ damaĝoj, sed estas franĉizo de 2000 €. Pro ĉi tiu kialo, la luiganto postulas egalvaloran **Kaŭcion**. Tia kaŭcio estos entute redonata se ne estas damaĝoj. La kaŭcio estas pagata de la jaĥtestro al la luiganto, sed ĉiuj partoprenantoj kontribuas per ĉioentena sumo de 150 € po persono liverata al la jaĥtestro per kontantaĵo. Je la fino de la velado, la jaĥtestro redonos la sumon al ĉiuj en la kazo de neniu damaĝo.
4. La **nombro de enboatigitaj personoj** dependas de la jaĥta dimensio kaj estas 6 personoj. En la kazo, ke la minima nombro de partoprenantoj ne estas atingita antaŭ la limdato, la FEI estraro tenas por si la rajton ŝanĝi la programon, aŭ nuligi la iniciativon, kun kompleta redono de la antaŭpago.
5. La **asekuro** ne estas inkluzivita en la partopreno. La partoprenantoj devas prizorgi por si mem.
6. La jaĥto ne havas **littukojn**; vi povas kunporti vian littukojn kun kuseno-kovrilon aŭ, plej bone, vian dormosakon.